Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO. SEPTEMBRO 2009, JARKOLEKTO 27
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@bigpond.com
Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Feriante de sia laboro, junulo iras viziti sian avinon. Kun li iras kolego.

Dum li parolas kun sia avino, lia kolego ekmanĝegas el bovlo da arakidoj staranta sur la kafotablo. Subite la bovlo malplenas.

Forirante lia kolego diras al la avino: ”mi pardonpetas, ĉar mi manĝis ĉiujn viajn arakidojn, avinjo.

Respondas la avino: ”Tio ne gravas, mi nur ĝojas, ke vi ŝatis ilin, filĉjo... de post kiam mi perdis miajn artefaritajn dentojn mi povas nur forsuĉi la ĉokoladon for de ili !”

Gravaj Esperanto-okazaĵoj

Merkredon la 2an de septembro je la 18a horo okazos renkontiĝo en la skatolfabriko.
Iam en septembro Katja invitos la virinojn al sia hejmo por floraranĝado. Necesos trovi okupadon ankaŭ por la viroj.
Merkredon la 7an de oktobro je la 18a horo okazos renkontiĝo en la skatolfabriko.
La jam populara kantofesto ĉe Indrani okazos ĉijare la 24an de oktobro.
Merkredon la 4an de novembro je la 18a horo okazos renkontiĝo en la skatolfabriko.
Sabaton la 7an de novembro ni posttagmezumos ĉe Trevor.
La AEA-kongreso okazos de la 27a ĝis la 30a de novembro en Kanbero.
Merkredon la 2an de decembro je la 18a horo okazos renkontiĝo en la skatolfabriko.
Dimanĉon la 13an de decembro ni, ĉe Indrani, festos la 150an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.
La AEA-Somerkursaro okazos en Sidnejo de la 10a ĝis la 25a de januaro 2010.

La Novzelanda Kongreso okazos en Velintono de la 26a de januaro 2010.
En 2010 la Universala Kongreso de Esperanto okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.
Inter la 9a kaj 23a de julio 2011 la AEA-kongreso okazos en Adelajdo. Kiel sciate la unua AEA-kongreso okazis en belega Adelajdo en la benita jaro 1911. Espereble kunkongresos kaj kunfestos ankaŭ ILEI.
Universala Esperanto-Asocio kongresos en 2011 en Kopenhago. Kia bonŝanco, ĉu ne? Ni estos devigataj elekti inter du el la plej belegaj urbegoj de la mondo !!!

Loĝanto en luloĝejo demandis sian najbaron: "Amiko, mi intencas tapeti mian sidoĉambron. Ĉar niaj du luloĝejoj identas, kaj ĉar vi jam tapetis vian, mi ŝatus vin demandi, kiom da tapetrulaĵoj vi aĉetis por via sidoĉambro".

"Por mia sidoĉambro mi aĉetis 30 rulaĵojn da tapeto", respondis la najbaro.

"Koran dankon", diris la viro elironte por aĉeti 30 rulaĵojn da tapeto.

Tapetinte sian sidoĉambron li refoje kontaktas sian najbaron:

"Amiko", li diras, "Tapetinte la sidoĉambron mi trovis, ke restas ankoraŭ 20 rulaĵoj da tapeto".

Respondis la najbaro: "Jes, ankaŭ mi trovis tion!"

Pri la ĝusta uzado de "sur", "ĉirkaŭ", "post" kaj "malantaŭ" kaj kiel ili ŝanĝas la nomojn de niaj vestaĵoj

Laŭ "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, represo de la Tria Eldono kun suplemento" 1987, "sur" estas prepozicio montranta pozicion de objekto aŭ estulo rilate al alia, kiu estas pli malalta kaj tuŝas ĝin. Por ni esperantistoj, kiuj tre entuziasmas pri gramatiko, tio estas eĉ tre interesa.

Ĉapelo neniam povas nomati surkapaĵo, ĉar ĝi ne nur tuŝas la kapon, sed parte kovras ĝin. Mi do proponas, ke ni ek de nun nomu ĝin kapingo, ĉar la kapo ne nur tuŝatas de la ĉapelo, sed la ĉapelo nur parte kovras la kapon, kio estas tre bona, precipe se oni estas kalvulo.

Tute alia afero estas la hararo. Ĝin oni povas nomi surkapaĵo, ĉu ne? ĉar la kapo situas malpli alte ol la hararo, kiu tuŝas ĝin. Sed pri la ĉapelo ne ĉiam sufiĉas diri nur kapingo. Se oni estas ekz. kukluksklanano, tiam oni devas enmeti sian kapon en blankan kapujon, ne kapingon, aŭ ĉu mi eraras. Ĝis nun mi neniam pripensis aliĝi al tiu klanaĉo. Mi ne timas montri mian vizaĝon al la mondo.

Ŝuon oni ne povas nomi surpiedaĵo, ĉar ĝi ne estas nur sur la piedo. Ĝi estas kaj sur kaj sub la piedo, kion ĉiu povas konstati tuj per rapida ekrigardo malsupren, ĉu ne? Mi do proponas nur piedujon por tiu utila objekto.

Ĝis nun mi pritraktis nur la ĉapelon kaj la ŝuon, escepte de la hararo, kompreneble. Sed kio pri la aliaj vestaĵoj? Post la ĉapelo sekvas la ĉemizo, ĉu ne? Ĝi komplete kovras la torson, ĉu ne? Ĝin ni do nomu torsujo! Tio estas tre logika, eĉ laŭ mia opinio. La kravaton ni nomu ĉirkaŭkolaĵo, ĉu ne? Laŭ la sama Plena Ilustrita Vortaro "ĉirkaŭ" estas prepozicio signifanta: en la spaco ronde kuŝanta ĉiuflanke de io, en ĉi tiu kazo, la kolo. Kaj la zono estas ĉirkaŭventraĵo. En tiu ĉi kazo, la ventro. La ĉirkaŭventraĵo estu longa aŭ mallonga laŭ la vasteco de la ventro de la individuo, ĉiuj konsentas pri tio. Sed kio pri la pantalono? vi demandas. Mi proponas postaĵujo, ĉar la postaĵo estas tute kovrita de ĝi, aŭ almenaŭ devus esti. Sed "post" estas prepozicio montranta tempon pli malfrua ol alia, do nia ŝatata vorto "postaĵo" estas mallogika. "Antaŭ" estas prepozicio montranta lokon pli proksiman rilate al tiu, kiu rigardas, aŭ lokon, al kiu frontas la ĉefa flanko de la objekto. "Postaĵo" estas do malĝusta. La ĝusta vorto estas "malantaŭaĵo"! Tial pantalono estas "malantaŭaĵujo, ĉu ne?

Ŝtrumpetoj kovras ne nur la piedojn sed ankaŭ parton de la kruroj. Ili estas do ne nur piedujoj, sed samtempe ankaŭ kruringoj, ĉu ne? Pri la ŝuoj legu refoje la frenezaĵon, ĉar se mi bone memoras, mi jam profunde traktis tiun problemon. Jen venis la fino de mia fantaziaĵo, sed se iu(j) el vi emas daŭrigi ĝin, vi estas pli ol bonvena(j)!

Osberto finis sian karieron kiel policano 25 jarojn post kiam ĝi komenciĝis. Ne plaĉis al li la streso, kaj li aĉetis 50

akreojn da kampo en Alasko, ĉar li ne plu deziris loĝi tro proksime al aliaj homoj.

Alasko tre plaĉis al li, la poŝtiston li vidis nur unu fojon ĉiusemajne kaj manĝaĵoj estis alportataj, el iu vendejo, al li unu fojon ĉiun monaton. Okazis nur tiuj du interrompoj en lia kvieta vivo.

Ses monatojn post lia transloĝiĝo iu frapis lian pordon. Li ĝin malfermis kaj vidis la plej grandegan barbulon, kian li neniam antaŭe vidis en sia longa vivo.

"Mi nomatas Horaco", diris la barbulo. "Mi estas via najbaro. Mi loĝas nur 60 kilometrojn iom pli norde de ĉi tie. Mi estas aranĝanta kristnaskan feston por vendredo. Vi estas invitata veni ĉirkaŭ la 17a horo".

"Bone", diris Osberto, "post ses monatoj ĉi tie estus bone renkonti la lokanojn. Elkoran dankon !"

Forirante Horaco diris: "Mi ŝatus averti vin. Plej verŝajne estos iom da drinkado."

"Neniu problemo", diris Tom. "Post 25 jaroj kiel policano mi povas drinkadi same kiel ĉiu alia."

Refoje la grandega barbulo ekforirante diris: "Plej verŝajne okazos ankaŭ iom da interbatalado."

"Nu, mi rilatas pace kun la plej multaj homoj. Mi certe venos vendredon. Koran dankon !"

"Plej verŝajne okazos ankaŭ senbrida seksumado !"

"Nu, ankaŭ tio ne estos problemo", diris Osberto ekscitiĝinte. Mi estis tute sola ses monatojn ! Mi certe ĉeestos la feston. Cetere, kion mi devos surhavi?"

"Tio tute ne gravas. Venos nur vi kaj mi!"

Kontribuita de Alano Mendelawitz

Vandaloj ankaŭ en Bjalistoko

Ne nur en Adelajdo, sed ankaŭ en Bjalistoko troviĝas malbonuloj. Unu el tiuj per farbo atakis la monumenton pri Zamenhof dum la Universala Kongreso. Sed ne nur tion. Pli frue iu ĵetis botelon da bruliga likvaĵo en la direkton de la Bjalistoka Esperanto-Centro. Ŝajnas ke niaj lokaj motorbiciklobanditoj povus lerni ion en Bjalistoko, ĉu ne?

Eĉ la amasloĝejo de junaj kongresanoj estis atakita. Ĝojigas min vidi, ke la militema kaj krimema krimularo komencas timi nin.

Iun tagon post kiam li finis en la lernejo, knabo el la unua klaso sidis ĉe la kurireja tablo manĝante iom da manĝaĵo. ”Panjo”, li diris, ”hodiaŭ posttagmeze mia instruistino min demandis, ĉu mi havas iujn pli junajn gefratojn, kiuj poste frekventos la lernejon”.

Ridetante la patrino de la knabeto respondis: ”Mi ĝojas, ke ŝi tiom interesiĝas pri vi. Kion ŝi diris, kiam vi respondis, ke vi estas sola infano?”

”Ŝi diris nur: ”Danke al Dio !”

Kopenhago en 2011

Finfine, 36 jarojn post la plej pasinta kongreso en Danujo, Kopenhago gastigos la Universalan Kongreson de Esperanto en 2011. Persone mi mem tre ŝatus preni parton en tiu kongreso, sed tio kompreneble neniel eblos.

Mi loĝis, antaŭ multaj jaroj, en Kopenhago. De kiam mi ĝin forlasis, ĝi multe ŝanĝiĝis, kaj povas esti malfacile por mi senti min hejme tie. Sed por vi, kiuj neniam, aŭ eble nur mallonge pasigis tempon tie, ĝi certe kaj sendube estas eĉ tre belega, interesa kaj vizitinda. Estas ĉio en Kopenhago, kaj la kopenhagaj esperantistoj estas treege bonvenigaj kaj amikemaj. Kopenhago havas belegan havenon tuj apud la reĝa palaco. Eble vi jam aŭdis pri la Malgranda Marvirineto, belega statueto situanta ĉe la haveno. Fotografatu tie apud ŝi. Ĉiuj aliaj faras tion. Promenu laŭ ”Langelinie”. Rigardu la belegan Anglan Preĝejon, kaj restu kelkajn minutojn rigardante la ”Ŝprucakvon Gefion”. Tiu fontano estas monumento honore al iu diino, se mi bone memoras, kiu ŝanĝis siajn filojn en virbovojn, per kiuj ŝi elplugis grandan pecon da tero el Svedujo. Tiun teron ŝi ĵetis en la maron, kie ĝi tuj fariĝis la insulo Sjælland, aŭ kiel oni diras Esperante, Selando. Interese estas, ke la granda dana insulo Selando havas preskaŭ precize la saman formon kaj grandecon kiel unu el la svedaj lagoj. Kredu tion, se vi povas! Post vizito al la haveno promenu la longan vojon laŭ ”Strøget” de la Reĝa Teatro ĝis la Urbdoma Placo. Kiam vi venos al ”Købmagergade” iru dekstren laŭ ĝi ĝis vi vidos tute rondan turon. Eniru ĝin. Sur la maldekstra flanke de la

strato situas ”Regensen”, t.e. studenta hejmo, kaj tia ĝi estas ek de la 1600-aj jaroj. La tiama reĝo, Kristiano la Kvara, konstruigis studentan preĝejon kun turo tute ronda kaj sen ŝtupoj. Oni tamen supreniras tre facile, ĉar la planko estas korktirilsimile konstruita. Plej supre en la turo estas observatorio. Ĝi ankoraŭ eĉ tre bone funkcias. Sur la muro iom alte estas skribite: ”Doctrinam et justitiam dirige, Jehova, in corde coronati Christiani, Qvarti 1642” tio signifas: ”Sinjoro, fideleco kaj justeco regu en la koro de la reĝo Kristiano la Kvara.”

De la ronda turo iru laŭ ”Skindergade” nur kelkajn metrojn ĝis ”Vor Frue Kirke”, t.e. ”la preĝejo de nia sinjorino”. Ĝi estas la ĉefpreĝejo de Kopenhago. La unuan konstruigis la episkopo Peder Sunesen, sed ĝi forbrulis baldaŭ poste. Oni rekonstruigis ĝin en 1316, sed ankaŭ ĝin konsumis la flamoj. Fine de la 1400-aj jaroj konstruiĝis alia, ĉifoje kun kupra turpinto. La 4an de septembro 1807 la angloj bombardis la preĝejon, sed la arĥitektoj V.F.K. kaj C.F. Hansen konstruigis novan, kiu ankoraŭ staras tie. La internon de la preĝejo modeste ornamas statuoj skulptitaj de Bertel Thorvaldsen. Ili estas nur kelkaj el liaj majstroverkoj. Jesuo Kristo staras ĉe la baptujo, la dek du apostoloj laŭ la muroj.

Kompreneble ne ĉiuj esperantistoj interesiĝas pri ĉefpreĝejoj, sed sciu, ke ĝuste en tiu preĝejo de Nia Sinjorino edziniĝis antaŭ nur kelkaj jaroj la tasmanianino Mary al la kronreĝido Frederiko de Danujo. Ŝi tamen ne fariĝis kronreĝidino, sed kronreĝinbofilino, aŭ, iom pli moderne, kronprincino.

De la ĉefpreĝejo iru laŭ ”Studiestræde” ĝis la Urbodoma Placo. Daŭrigu iomete laŭ ”Vesterbrogade” ĝis unu el la enirejoj de la amuzejo ”Tivoli”, kiu estas kaj belega, sed ankaŭ tre amuza. Kaj ne forgesu viziti la bestĝardenon. Krom la multaj ekzotaj bestoj vi trovos tie ankaŭ belegan kaj ĉarmegan kopion de la Ejfel-turo. Forgesu nenion, ĉar kiam vi hejmenvenos, mi certe pridemandos vin pri tio, kion vi faris dum vi estis en unu el la plej belegaj urboj de la mondo.

Do iru al Kopenhago, se vi povos. Vi neniam forgesos vian tempon kaj restadon tie.

Tri inĝenieroj kaj tri revizoroj vojaĝas vagonare al Kanbero por la AEA-kongreso. En la stacidomo la tri revizoroj aĉetas po unu unudirektan bileton. La inĝenieroj aĉetas entute nur unu bileton.

”Kiel en la mondo povos tri homoj vojaĝi per nur unu bileto?” demandas unu el la revizoroj. ”Rigardu, kaj vi lernos,” respondas unu el la inĝenieroj.

Alvenas la vagonaro, kaj ĉiuj ses eniras ĝin. La revizoroj prenas siajn sidlokojn, sed ĉiuj tri inĝenieroj eniras necesejon kaj fermas la pordon.

Baldaŭ post kiam la vagonaro estas forveturinta, venas la konduktoro kolektante biletojn. Li frapas la necesejan pordon dirante: ”biletojn, mi petas.”

La pordo malfermiĝas nur tre iomete, unu brako aperas kun bileto enmane.

La konduktoro prenas la bileton kaj daŭrigas sian laboron, (aŭ ĉu mi diru deĵoron?)

La revizoroj vidis tion kaj konsentis, ke tio estas eĉ tre bona ideo. Tial, post la kongreso en Kanbero, ili decidas kopii la inĝenierojn survoje hejmen por ŝpari iom da mono (revizoroj havas renomon esti ŝparemaj, ĉu ne?) Alveninte al la stacidomo, ili aĉetis nur unu bileton por la hejmvojaĝo.

Miregite ili vidas, ke la inĝenieroj tute ne aĉetas bileton.

”Kiel vi vojaĝos sen bileto?” diras unu el la revizoroj.

”Nur rigardu, kaj vi lernos ion,” respondas unu el la inĝenieroj.

Alvenas la vagonaro, kaj ili ĉiuj ses eniras ĝin. La tri revizoroj eniras necesejon, kaj la tri inĝenieroj eniras apudan necesejon. Foriras la vagonaro.

Baldaŭ poste unu el la inĝenieroj forlasas sian necesejon kaj iras al la necesejo, en kiu sidas la tri revizoroj.

Li frapas la pordon dirante: ”biletojn, mi petas!”

Pardonpeto

Ni tre bedaŭras la preskaŭ senenhavecon de Tamen Plu ĉi-monate. La kaŭzo estas, ke iu virino venis al nia pordo kaj persvadis nin nuligi niajn rilatojn kun ”iprimus’ kaj anstataŭe uzadi tiujn de ŝia firmao ”Telstra”. Ni esperis, ke ŝi pravas, ke nun la komputiloj funkcios multe pli bone, la prezoj fariĝos multe malpli altaj ktp.

Dek kvar tagojn poste Telstra telefonis al ni dirante, ke nun estas tempo por ke ni telefonu al iprimus postulante ke ili malfunkciigu ĉiujn niajn interrilatojn. Tiam poste ni telefonu al Telstra dirante, ke tio estas nun okazinta.

Kiam ni telefonis al Telstra ili respondis, ke bone, eĉ bonege. Nun ni devos atendadi nur kvin aŭ dek tagojn, tiam ili refunkciigos niajn komputilojn kaj ĉio estos multe pli bona.

Do, kiel vi jam divenis, ĉu ne? Ni havis neniujn eblecojn serĉi Esperanto-novaĵojn interrete, kaj neniu povis informi nin pri io ajn. Tial vi trovas ĉi-numere tiom da t.n. ŝercoj. Ni pardonpetas ankaŭ al tiuj, kiuj provis kontakti nin per la interreto !

La bonega ĉensegilo

Deziras viro aĉeti ĉensegilon, ĉar li havas tro da arboj en sia malantaŭa ĝardeno. Li direktas sin al segilvendejo, en kiu li demandas la vendiston pri ĉensegiloj.

La vendisto diras al li: ”Nu, mi havas multajn malsamajn modelojn, sed mi rekomendas al vi aĉeti la plej novan. Tiu ĉi ĉensegilo segos 100 kubikmetrojn da brulligno en nur unu tago.”

La viro pagas, eble iom tro, hejmen portas la ĉensegilon kaj eksegas la arbojn. Post pluraj horoj da arbosegado li konstatas, ke ĝis nun li segis nur 2 kubikmetojn. Li decidas cedi. ”Kiel mi povas segi horon post horo kaj segi nur 2 kubikmetrojn?” li demandis al si. ”Morgaŭ mi eĉ tre frue rekomencos, kaj segos la tutan tagon.”

La sekvan matenon li ellitiĝas je la 4a horo kaj segas kaj segas, eĉ segadas ĝis noktiĝo. Tamen li segis nur 5 kubikmetrojn.

La viro estas konvinkita, ke tiu ĉensegilo estas eĉ tre malbonega. ”La vendisto diris al mi, ke ĝi povas senprobleme segi 100 kubikmetrojn en nur unu tago. Morgaŭ mi reportos ĝin al la vendisto,” diris la viro al si.

La sekvan matenon la viro reportas la ĉensegilon al la vendisto kaj klarigas al li la problemon. La vendisto, surprizita de la klarigo de la viro, elprenas la ĉensegilon el ĝia skatolo. Diras la vendisto: ”Hm, ĝi ŝajnas bona.”

Tiam la vendisto ekfunkciigas la ĉensegilon, kaj la viro demandas: ”kio estas tiu bruo?”